

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Decembro 1987. Numero 9-a. Jarkolekto 2-a

Jen dulingva

Kiel ni jam anoncis, jen dulingva LA RIVEREGO. Ĝin nun ricevas la ordinaraj membroj kaj la Amikoj de Esperanto de E.S.K. Mi esperas, ke la enhavo plaĉos al vi. Ne ĉiuj artikoloj estos en ambaŭ lingvoj: kelkaj estos nur en Esperanto, kelkaj nur en la franca, kelkaj en ambaŭ lingvoj, sed ne nepre ĉiam temas pri nura traduko.

Ĉar la legantaro de LA RIVEREGO nun ekkreskas, ankaŭ indas kreskigi ĝian redaktantaron. Bona lingvo-scio ne estas nepra, farendas multaj taskoj. Se vi interesiĝas pri tia laboro, kontaktu la Societon. □

Bienvenue aux *Amis de l'espéranto*

Comme on vous l'a déjà annoncé, les *Amis de l'espéranto* de la Société québécoise d'espéranto reçoivent désormais LA RIVEREGO, en version bilingue. On pourra y trouver certains articles en français seulement, certains en espéranto seulement, et d'autres dans les deux langues; mais attention: il ne s'agit pas toujours d'une simple traduction! Pour vous exercer, comparez les deux versions.

Puisque l'auditoire de LA RIVEREGO augmente, il faudrait aussi songer à agrandir son comité de rédaction. Il n'est pas nécessaire de savoir l'espéranto: la fabrication d'une revue comporte de nombreuses étapes. Si ce genre de contribution au *Movado* vous intéresse, veuillez contacter la Société. □

Akupunktura kurso en Esperanto

La Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj decidis organizi akupunkturajn kursojn por instrui kaj praktiki ĝin en Esperanto.

Tempo : 1988.07.16-08.08 (ĝuste antaŭ la 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, funkciiganta de la Ĉina Akademio de Sciencoj, t.e. 1988.08.10-16).

Loko : en Pekino, Ĉinio.

Lernopago : 500 Usonaj dolaroj.

Loĝejopago : 200 Usonaj dolaroj.

Aliĝiloj haveblaj ĉe E.S.K.

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate.

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktoro: Sylvain Auclair.

Kontribuis Suzanne Bolduc, Patrice Mongeau kaj Normand Fleury.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: keb-k-d.

Unuopa numero: 1,50 \$.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal, Québec
KANADO H2G 3C8 telefono : (514) 495-8442

Ankaŭ E.S.K. jubileas

E.S.K. ĉi-jare jubileas: ĝi nun estas kvinjara... Ĝi fondiĝis en septembro 1982, dum la Unua Tutkebekia Esperanto-Renkontiĝo, en Sankta-Mikaelo-de-la-Sanktuloj. Tiun kunvenon okazigis Normando Fleury kaj Zdravka Metz. Mi demandis al Normando, kial ili faris tion.

N.F. – La unua celo estis nur renkontiĝo. Tiam, la nuraj renkontiĝoj, krom la klubaj, estis la Kanadaj kongresoj, ofte tre malproksimaj. Ni pensis, ke utilas plioftigi tiajn renkontiĝojn.

Ni invitis la Kebekiajn membrojn de la Kanada Esperanto-Asocio. Venis mire multaj homoj, el diversaj regionoj de Kebekio. La renkontiĝo okazis dum la laborfesta semajnfino, en gastejo en Sankta-Mikaelo-de-la-Sanktuloj, kie ni laboris. Okazis kunsidoj, ekskursoj en la arbaro, prezento de la teatraĵo « La eta princo ». Ni ankaŭ reklamis en la *Journal de Lanaudière* pri publika vespero. Sed ĝin ĉeestis eble nur 2-3 homoj.

La kunsidoj estis tre entuziasmoplenaj. Tuj ekestis la ideo fondi Kebekian Asocion. Tre vigla estis la diskuto pri ĝia... nomo. Fine voĉdone venkis ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA kaj SOCIÉTÉ QUÉBÉCOISE D'ESPERANTO. Tre gravas la fakto, ke ĝi komenciĝas per ESPERANTO, pro alfabeto listigo.

S.A. – Kiu estis la celoj de tia Asocio ?

N.F. – Ĝi havis du ĉefajn celojn: estigi kontaktojn kun la Kebekia registaro, rilate edukajn aferojn – ĉar, en Kanado, instruado estas provinca afero, pli indas agi per provinca asocio – kaj okazigi pli oftajn renkontiĝojn ol la nura jara K.E.A.-kongreso: laŭ la partoprenantoj, eblus eĉ okazigi fakajn renkontiĝojn.

Tre gravas la afero, ke la Societo estu oficiale registrita. Oni dividis la taskojn: ĉefe Petro Collinge laboris pri la statuto kaj mi okupiĝis ĉefe pri la oficialigo. Dum la renkontiĝo, okazis ankaŭ elekto de provizora estraro.

S.A. – Kaj kion pri la nuna atingo de tiuj celoj ?

N.F. – Pri la edukado, la Societo donis la memuaron al la registaro. La nuna laboro estas farenda ĉe la loka nivelo, ĉe ĉiu unuopa lernejo kaj *commission scolaire*. Sekve, tio devas okazi pere de lokaj kluboj, per personaj kontaktoj kun respondeculoj.

Pri la renkontiĝoj, E.S.K. estas necesa, eĉ nur por okazigi aranĝojn en lokoj ankoraŭ sen Esperantistoj. Sed tiu-rilate, la ĝisnuna agado ne havas plenan sukceson. Necesas multe da laboro, kaj la partoprenant-nombro ne estas kontentiga.

Ĉefa problemo estis kaj estas trovi homojn, kiuj pretas agadi kaj transpreni respondecojn. Sen tiaj homoj, neniu laboro fareblas.

S.A. – Cetere, kion utilas E.S.K. nuntempe ?

N.F. – Laŭ mi, la nuna celo estu informado. Provinca asocio multe pli bone konas sian medion, la gazetojn, k.s. ol povas tutKanada Asocio. Aliflanke, lokaj kluboj ne aspektas sufiĉe serioza afero por gazetisto.

Nuntempe, E.S.K. povas multe pli rapide kaj efike trakti informpetojn ol K.E.A. Anglalingvaj gazetistoj de Radio-Canada telefonis al Montrealo el Toronto kaj Vankuvero por akiri informon kaj intervjuojn. Kial tiuj grandaj urboj ne povas sin organizi informcele ?

S.A. – Ĉu devus ekesti aliaj provincaj asocioj ?

N.F. – Tute jes. Laŭ mi, K.E.A. devus instigi starigon de asocioj en Brita Kolumbio, Ontario kaj Nov-Skotio, t.e. tie, kie jam estas sufiĉe vigla Esperantistaro. Tiuj asocioj havu ĉefe la samajn celojn kiel E.S.K. : informadon kaj okazigon de renkontiĝoj. Unua renkontiĝo de nova Esperantisto estu la provinca : Kanado estas tro granda. Kaj nova Esperantisto ne tuj pagu la altan kotizon de K.E.A.

Kompreneble, estas servoj pli bone Kanad-nivele prizorgataj, kiel la perado de revuoj, kaj la informado en lokoj, kie ankoraŭ ne estas multaj Esperantistoj.

Sed oni ne povas *devigi* la starigon de tiaj asocioj. E.S.K. bone ekfunkciis, ĉar ĝi ne estis la ideo de unu persono, sed la komuna volo de multaj Kebekiaj Esperantistoj.

S.A. – Dankon. □

La S.Q.E. a cinq ans

C'est en effet en septembre 1982, lors d'une réunion organisée par Normand Fleury et Zdravka Metz, à Saint-Michel-des-Saints, que fut fondée la Société québécoise d'espéranto (S.Q.E.).

À cette époque, la seule rencontre espérantiste au Canada était le congrès annuel de l'Association canadienne d'espéranto (A.C.E.). Normand et Zdravka trouvaient qu'il était souvent trop loin et pas assez fréquent. D'où cette *Unua Tutkebekia Esperanto-Renkontiĝo* pendant laquelle on a émis et accepté l'idée d'une association québécoise.

Ses premiers buts ont été l'organisation de rencontres et l'établissement de relations avec le gouvernement en ce qui a trait à l'enseignement de l'espéranto au Québec. On a donc rédigé et présenté un mémoire à ce sujet. L'espéranto est maintenant enseigné dans une école secondaire de Sherbrooke.

Selon Normand Fleury, président de la S.Q.E., on doit aujourd'hui ajouter l'information à ces buts. C'est la S.Q.E. qui a organisé les campagnes d'information pour le Centenaire. Et des journalistes anglophones de Radio-Canada téléphonent de Toronto et de Vancouver pour obtenir des renseignements et des entrevues téléphoniques !

C'est un peu pour ces raisons que Normand croit que l'A.C.E. devrait favoriser la mise sur pied d'associations provinciales indépendantes, au moins en Colombie-Britannique, en Ontario et en Nouvelle-Écosse, c.-à-d. là où l'on retrouve un assez grand nombre d'espérantistes. Leurs buts seraient semblables à ceux de la S.Q.E. : information et organisation de rencontres. □

Kongresoj

En 1988, la du ĉefaj mondaj kongresoj estos jenaj :

- la Internacia Junulara Kongreso (IJK), en Zagrebo, Kroatio, Jugoslavio, de la 16-a ĝis la 23-a de julio ;
- la Universala Kongreso (UK), en Roterdamo, Nederlando, de la 23-a ĝis la 30-a de julio.

Informoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe la Societo. □

Au Parlement britannique

Une réception a été organisée récemment à la Chambre des Communes de Grande-Bretagne pour le groupe parlementaire en faveur de l'espéranto, pour célébrer le centenaire de la langue. Le député Roger Gale présidait la cérémonie, qui avait attiré tant de députés, qu'un deuxième salon dut être ouvert !

Le groupe parlementaire en faveur de l'espéranto est actuellement le groupe parlementaire le plus nombreux du Parlement. Il est constitué de 204 parlementaires, dont les Ministres Robin Squire, Ken Weetch et Geraint Howells. Bien qu'une quinzaine seulement de parlementaires sache s'exprimer en espéranto, beaucoup d'autres soulignent le besoin de la langue internationale, qui, selon eux, aiderait à renforcer les liens entre les nations du monde.

Alors que l'enseignement des langues n'est pas obligatoire en Angleterre et que le projet de réforme ne prévoit consacrer que 10 % aux langues vivantes, les parlementaires britanniques viennent de se prononcer en faveur de l'enseignement de l'espéranto. Rappelons que sur un million d'enfants scolarisés, il n'y a que 63 000 garçons et 94 000 filles qui apprennent le français. L'espéranto a été accepté comme matière officielle pour l'obtention du Diplôme général de l'enseignement primaire. [source : revue française d'espéranto, nov. 1987]

La Chine s'éveille

Plus de 400 000 Chinois, selon les informations les plus récentes, apprennent ou pratiquent aujourd'hui l'espéranto.

Le sixième cours de formation de professeurs des grandes écoles à l'enseignement de l'espéranto a pris fin le 16 juin à l'institut des langues étrangères de Shanghai. Douze professeurs ont terminé ce cours avec succès et iront enseigner dans des établissements d'enseignement supérieur du pays. Au début de l'année, pas moins de 57 universités, instituts et grandes écoles avaient un cours officiel d'espéranto.

Pensez qu'à la mort de Mao (1976), il n'y avait tout au plus qu'un millier d'espérantistes en Chine, la plupart vétérans. [source : SAT-Amikaro]

De l'Amazonie au Népal

Après avoir fait l'objet d'une recommandation du ministère de l'éducation du Japon dans sa traduction japonaise, le livre « Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo » doit paraître en traduction népalaise sous forme de feuilleton dans deux journaux du Népal.

C'est le récit des aventures vécues en forêt amazonienne par Tibor Sekelj en compagnie d'un jeune indien.

Explorateur, alpiniste, muséologue, anthropologue, écrivain, Tibor Sekelj a aussi écrit d'autres ouvrages en diverses langues et en espéranto dont l'un sur le Népal : « Nepalo malfermas la pordon ». Ce Yougoslave est aussi l'auteur de « À travers le pays des Indiens » et de « Tempête sur l'Aconcagua », sommet sur lequel il a planté le drapeau espérantiste le 13 février 1944. [source : SAT-Amikaro]

À Zagreb, en Yougoslavie

Le traditionnel festival de théâtre de marionnettes, qui fêtait cette année sa vingtième édition, a tenu à célébrer le centenaire de l'espéranto par un vaste programme culturel.

C'est ainsi que les 300 participants de 38 pays ont pu apprécier dix spectacles de marionnettes ; trois troupes théâtrales, de Yougoslavie, Bulgarie et Union soviétique ; un concert de la chanteuse canadienne (d'origine française et vivant en Colombie-Britannique) Joëlle Rabu ; des conférences sur les problèmes linguistiques dans la communication internationale ; une soirée littéraire où plusieurs écrivains ont présenté avec humour des extraits de leurs œuvres en espéranto ; et enfin plusieurs films. [source : revue française d'espéranto, sept.-oct. 1987]

En Kontraŭkero

Eĉ se la estraro iam pensis nuligi la aranĝon pro manko da aliĝoj, finfine bone okazis, pasintajn 10-an kaj 11-an de oktobro, la renkontiĝo en Kontraŭkero (tio estas la plej ĝenerale aprobata traduko por Contrecœur). Entute aliĝis kaj venis dudeko da homoj, Esperantistoj kaj komencantoj, el la Montreala, Kebeka kaj Otava regionoj.

Estas malfacile priskribi tian renkontiĝon. Ni multe kunparolis, prelegis, lingvo-ludis, kantis, kaj promenis en la arbareto malantaŭ la domo. Dum la sabata posttagmezo, la kvar komencantoj ricevis apartan programon: rapidan kurson donis Normando kaj Zdravka. Krom tiuj horoj, estis bedaŭrinde neniu taŭga programo por ili.

Estas tamen strange ekscii, ke la ESK-anoj tre volas, ke oni organizu renkontiĝojn – meznombro du, krom la jarkunvenon, laŭ la movada enketo de Normando. Malmultaj tamen ĉeestas ilin...

Malgraŭ tio, la estraro decidis denove organizi tian renkontiĝon, en venonta majo. Estus bone tiurilate estigi ian kutimon de jaraj renkontiĝoj. Estos en majo aparta prizorgo al la komencantoj. Pliajn detalojn vi trovu en la venontmarta LA RIVEREGO. □

À Contrecœur

Après un départ difficile – on l'a presque annulée faute de participants – la rencontre de d'octobre à Contrecœur a finalement été très réussie. Une vingtaine de personnes sont venues, dont quatre débutants. Ces derniers ont eu droit, samedi après-midi, à un « cours accéléré », donné par Normand Fleury et Zdravka Metz.

Venus d'Ottawa, de Montréal et de Québec, les participants ont eu l'occasion de se rencontrer, de bavarder, de se promener dans le bois derrière la maison. On a aussi chanté et fait des concours de mime (où il fallait deviner le mot que l'« acteur » cherchait à communiquer).

Une autre rencontre de ce genre aura lieu en mai. Les débutants (et les non-espérantistes) auront alors droit à un programme spécial, et pas seulement à un après-midi. Mais tout le monde est évidemment invité. On trouvera les détails dans LA RIVEREGO du mois de mars 1988. □

Montrealaj paĝoj

de Patriko Mongeau

programo

La klubaj vesperoj daŭre okazas ĉiun unuan lundon de la monato, je la 19a horo kaj duono.

Januaro ne estos escepto: La kunveno okazos la 4an. Sinjoro Desjardins prezentos al ni filmon pri Pollando. Kelkaj prelegoj okazos ĉi-vintre, sed oni ankoraŭ ne elektis daton. Sinjoro Brody parolos al ni pri la Universitato de San Marino; sinjoro Brent pri lingvoplanado kaj Esperanto. Krom la ĉefa parto de la vespero, kiu estas foje prelego, foje prezento de filmo aŭ lumbildoj, foje lego de novelo aŭ rakonto, foje diskuto, ni ĉiam klopodos fari kantadon kaj ludon. Ĉiam estas tempo ankaŭ por anoncoj kaj paŭzo, dum kiu eblas prunti librojn kaj revuojn.

Sinjoro Fleury starigis duan monatan renkontiĝon. Tiu estas nur por konversacia rondo. Ĝi okazas la 3an lundon de la monato, je la 20a horo. Oni atendas la progresantojn, kiuj volas praktiki la lingvon. Se spertuloj volas veni, estus oportune, ke ili proponu sian helpon al Normando, kaj eble lin anstataŭu de tempo al tempo, ĉar tiu kunveno celas havigi al la progresantoj (ne la spertuloj) la okazon praktiki.

jarkunveno

La jarkunveno okazos la 25an de januaro, je la 19a horo kaj duono, ĉe la Esperanto-domo. Dum tiu kunveno, la deĵorintaj estraranoj faros raporton pri sia agado. Poste, ĉiuj membroj povos pridiskuti la kluban agadon kaj fari decidojn aŭ rekomendojn pri la estonta agado. Fine okazos la elekto de la nova estraro por 1988. Eblas kandidatigi skribe al la estraro aŭ persone dum la jarkunveno.

regularo

MEK havas nun novan regularon. La antaŭa regularo estis farita en 1971. Ĝi enhavis kelkajn partojn ne plu praktikajn niatempe, pro kio ni decidis ĝin reverki. Ĝi estas tre simpla, kaj

celas, krom iel oficialigi la ekziston de la klubo, helpi la membrojn kaj la estraron funkciigi ĝin. Ĉiu membro povas peti kopion de tiu nova regularo (senkoste).

revuoj

La estraro decidis aboni du revuojn dum 1988. En 1987, ni abonis nur «Monato»-n. Ni reabonos ĝin, kaj abonos krome «Heroldo de Esperanto»-n. Ni elektis la unuan, ĉar ni scias ke ĝi plaĉas al la membroj, kiuj ofte demandas, ĉu ĝi alvenis, kaj ofte ĝin pruntas. Ni elektis la duan, ĉar ĝi estas la plej ofta esperanta internacia revuo, kaj laŭ nia scio, nun neniu membro ĝin abonas, tiel ke ĝi povas utili al ĉiuj.

biblioteko

Nia biblioteko nun estas ordigita, dank'al la laboro de Sinjoroj Brosseau kaj Ludva. Dankon al ili. Se ni volas ke ĝi ne disordiĝu, estus bone ke iu responsulo okupiĝu pri registrado de la pruntoj kaj reordigo de la libroj post pruntado. Tian personon ni serĉas. Ĝi devas esti iu kiu ofte venas al la klubo, aŭ pli ol unu persono devas kunlabori, por certigi, ke plejofte unu el la responsuloj ĉeestos la kluban vesperon. Proponu vin dum la venonta kluba vespero!

kursoj - cours

Okazis ĉi-aŭtune du kursoj samtempe. Entute venis 15 lernantoj, kiuj nun estas amikoj de Esperanto.

Nous donnerons un cours avancé d'espéranto cet hiver. Une soirée d'information à ce sujet aura lieu le mercredi 13 janvier à 19 h 30, au sous-sol du 6358, rue de Bordeaux.

Il y aura aussi deux cours pour débutants. Les soirées d'information (les leçons « zéro ») auront lieu :

le mardi 19 janvier, à 19 h 30, au 177, avenue des Pins, est (il s'agit du centre Bahá'í de Montréal, mais tous sont les bienvenus) ;

le jeudi 21 janvier, à 19 h 30, au sous-sol de 6358, rue de Bordeaux.

Kotizo

Por 1988, ni fiksas la kotizon al MEK je 5 \$. Vi povas tuj plenigi la ĉi-suban aliĝilon kaj sendi ĝin kun ĉeko al

Montreala Esperanto-Klubo,
C.P. 126, succ. Beaubien
Montréal, Québec
H2G 3C8

aŭ aliĝi dum kluba vespero. En 1987, ni havis 32 membrojn. Kiom da ni havos en 1988?

Aliĝilo al Montreala Esperanto-Klubo por la jaro 1988

nomo: _____ antaŭnomo: _____

adreso: _____

_____ poŝta kodo: _____

telefono: (____) ____-____ aĝo: _____

subskribo: _____

Estraraj informoj

Denove la estraro ŝanĝiĝas

Pro personaj kaŭzoj, Miroslav Ludva bedaŭre devis forlasi sian estraran postenon. Post esploro, la estraro elektis S-ron Ron Séguin kiel anstataŭanton.

Pri la protokoloj

LA RIVEREGO ne publikigas la protokolojn de la Societo, ĉu tiujn de la estrar-kunsidoj, ĉu tiujn de la ĝeneralaj kunsidoj. Ili estas longaj tekstoj, ne plej interesaj por multaj membroj kaj abonantoj. Tamen, membroj, kiuj deziras akiri ilin, simple petu ilin al la Societo.

Vi ankaŭ memoru, ke membro povas same peti kaj akiri ekzempleron de la Statuto de la Societo.

Pri la estraro de la Kanada Esperanto-Asocio

E.S.K. havas la rajton elekti sian reprezentanton ĉe la estraro de K.E.A., por la du venontaj jaroj. Tiu reprezentanto estos Victor C. Jaar, jam estrarano de E.S.K.

Nova flugfolio

E.S.K. decidis eldoni propran ĝeneralan flugfolion, franclingvan. Laŭ la estraro, neniu nun havebla franclingva flugfolio estis taŭga. La nova flugfolio baldaŭ estos preta. Ĝi pli-malpli priskribas la movadon, kaj substrekas la nunan utilon eklerni la lingvon. Kaj ĝi mem entenas aliĝilon, por ke la leganto povu kiel eble plej facile iĝi *Amiko de Esperanto*. Oni baldaŭ presigos mil ekzemplerojn de ĝi.

Plurjaraj kotizoj

La estraro ankaŭ decidis ke, ekde la venonta jaro (jes ja, la estraro jam pripensas la jaron 1989-an), eblos pagi al E.S.K. plurjaran kotizon. Sekve, vi povos aliĝi al E.S.K. por unu, du aŭ tri jaroj, kontraŭ pago de unuobla, duobla aŭ triobla jara kotizo. La plurjaraj aliĝontoj ne ĝuos rabaton, sed estos ŝirmitaj kontraŭ forgeso kaj eventualaj plialtiĝoj de la kotizo.

Pour plus d'un an

Dès l'an prochain (1989), il existera des cotisations pour un, deux ou trois ans. Les prix pour deux et trois ans seront exactement le double et le triple du prix de la cotisation annuelle. Il s'agira d'une protection contre une éventuelle augmentation des prix. Ce nouveau système sera aussi valable en ce qui a trait aux cotisations des *Amis de l'espéranto*. □

Korektoj

En la lasta RIVEREGO, mi faris erarojn en la artikolo pri loknomoj. Mi asertis, ke ĝis nun neniam estis Esperantisto en Teranovo. Laŭ Manŭelo Kampanjaha, jam estis unu; sed tiu delonge mortis aŭ forlasis la movadon. Mi ankaŭ asertis, ke la proponita vorto *Abegŭetio* devenas de la nomo de iu Indiana popolo. Ĝi fakte estas la nomo de la ĉefa insulo de la provinco *Princ-Edvarda Insulo*, en iu Indiana lingvo.

S-ro Kampanjaha ankaŭ riproĉis al mi (mi renkontis lin en Kontraŭkero), ke mi pritraktis ne sufiĉe serioze liajn proponojn de Indiandevenaj nomoj, kaj akceptas nur la blankulajn nomojn kiel verajn nomojn. Mi ja opinias, ke la Indiandevenaj vortoj ne taŭgas en la pridiskutitaj kazoj, ĉar ili tro malsimilas kun la nuntempe uzataj nomoj (jes blankulaj, sed...). Mi plezure bonvenigas ĉies komentojn kaj opiniojn pri tiu temo. □

Jen nova varbilo

La estraro de E.S.K. ekpensis pri nova maniero varbi Amikojn al nia movado (kaj Societo). Ni uzis paĝindikilojn, amas-komunikilojn, revuojn, jen la kuponaroj. Temas pri 500 grupoj de etaj folioj (9 cm per 11 cm), 50-ope kungluitaj, kaj alglueblaj al afiŝo, informtabulo, k.s. La celo estas plifaciligi la informpetojn; la informpetantoj deprenu unu kuponon, sur kiu estas la adreso de E.S.K., la peto kunsendi aŭ frankitan koverton kaj loko por skribi siajn nomon kaj adreson. La baza ideo de Normando Fleury estas, ke ni uzu la jubileajn afiŝojn. Restas en la LibroServo de K.E.A. granda stoko de belaj jubileaj afiŝoj eldonitaj de U.E.A., kiujn ni devas uzi kiel eble plej baldaŭ, ĉu ne ? Tiel oni simple gluu kuponaron al la afiŝo, kaj jen alloga varbilo.

Ĝi ankaŭ havas aliajn celojn. Oni jam almetis kelkajn al jubileaj aŭtobusaj afiŝoj. Kaj eblas uzi la kuponaron sole, sur informtabulo, en trafikaj lokoj. Tial eblas mendi ilin de E.S.K. ; ni invitas ĉefe tiujn, kiuj loĝas en iel foraj lokoj.

Pour promouvoir le mouvement

La Société québécoise d'espéranto a récemment fait publier sous forme de blocs des formulaires de demandes d'information. Il s'agit de 500 paquets de 50 feuilles 9 cm par 11 cm, sur lesquelles les personnes intéressées n'ont qu'à écrire leurs nom et adresse avant de nous les envoyer. On peut les coller n'importe où, entre autres sur les très belles affiches du centenaire imprimées par l'Association mondiale d'espéranto. Si vous trouvez l'occasion de les utiliser pour propager l'espéranto dans votre région (surtout si vous habitez hors de Montréal), nous vous invitons fortement à nous en demander.

Paciĝi aŭ ne paciĝi

Poemo estas feliĉe dia donaco,
Do devas ŝpruci sen nia propra penado,
Alie versoj ne povus voki al paco,
Se ĉiam spronas kruele mensa trukado.

La vivo estas poemo kore fontanta,
Kaj ritmo ĝia verdece kreskas milflore,
Per harmonia, per amo nia vartanta,
Kaj rave fruktas sur l'homa tero ĝusthore.

Serena estu laboro kiel ripozo ;
Plezuro virta naskiĝu ĉie en kosmo ;
Spontane kreu spirito meze de paŭzo.

Ĉu eblas, diru, mondpacon vekti barakte ?
Ĉu sencas homojn paciĝi dum ni angoras ?
Respondi ĝojon al vi mi lasas fintrakte.

Klaŭdo Mercier

La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Decembro 1987-a. N-ro 9-a

Ĉi-numere:

Premier numéro bilingue
Quelques nouvelles du monde
Pri la Kontraŭkera renkontiĝo
Alia Jubileo : E.S.K. kvinjarigas

Société québécoise d'espéranto
C.P. 126, succ. Beaubien
Montréal, Québec
H2G 3C8